

Dieter Trautwein,
Benu nin, Sinjor'

tradukita de Manfred Retzlaff

1.) Benu nin, Sinjor',
ke ni ne disiĝu.
Ke ni estu viaj,
ni plikonsciĝu.
Solaj estas ni
sur la Ter' neniam;
ridon, ploron, ĉiam
ilin benos vi.

2.) Mem ne povas iu
benon akapari;
ĉar vi donas multe,
ni ne devas ŝpari.
Flori povas ben',
kie ni disdonas,
amas kaj pardonas;
iĝas for ĉagren'.

3.) Pacon vi jam donis,
sed ĝi fariĝendas,
inter ni ĉi tie
efektiviĝendas.
Helpu ĉiam nin,³
ke ni faru pacon.
Donu vian gracon,
ke ni ĝuu ĝin.⁴

*Traduko de la Germana poemo "Komm, Herr, segne uns" de Dieter Trautwein en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1983-06-01.*

MR-065-01 / Arg-741-1496 (2012-12-30 16:47:10)

³aŭ:

Helpu ĉiam nin,
ke fariĝu paco.
Agu ni sen laco,
ke ni ĝuu ĝin.

⁴aŭ:

Helpu ĉiam nin,
en laboroj pacaj.
Ni ne iĝu lacaj,
ĝis ni ĝuos ĝin.